

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

LA INTERNACIA TRINKAJO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark

N° 270,042

Marque déposée

N° 13,195

Registered label N° 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

BUCHANAN, SCOTT & C°

Garthland street,

GLASGOW (Skotlando).

ADELBODEN, Berna Oberlando, 1350 m. s. m.

— S V I S U J O —

Plej bela kaj sunplena vintra stacio.

Ĉiuj sportoj per skioj, glitŝuoj, glitiloj

☆☆ Internacia Apoteko Th. HOPF, ☆☆

ESPER. KONSILANTO

aŭtoro de la ilustrita gvidlibreto en Esperanto

« TRA BERNA OBERLANDO »

aĉetebla ĉe

OSCAR HOPF en THUN

Svisa Esperanta Eldonejo.

KRISTNASKO

MUZIKVERKO

Poezio de TH. GAUTIER. Esperantigita de D^{ro} PHILIPPET.

Muziko de L. RIGOIR.

Prezo 1 fr. 50 c. — Ricevebla ĉe la

Preso Esperantista Societo

33, rue Lacépède, — PARIS.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1. oktobro 1906

Raporto pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève

521

Nia aldono literatura (paĝoj 289-304) : **Por kaj kontraŭ Esperanto** de D-ro VALLIENNE (*daŭrigo*).

Raporto

pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève.

(*Daŭrigo*)

« Inter la projektoj rilataj al la ĝenerala organizo de l'esperantistaro, ekzistas unu, kiu, pro sia praktika karaktero, ŝajnas al ni rekomendinda al la atento de l'Kongreso. Ĝi estas la ideo, prezentita de S-ro Carles (en Béziers), kaj de la Esperantista Klubo en Vieno, pri la elekto, en la diversaj urboj, de *representantoj*, aŭ *Konsuloj*, de Esperanto.

« Tiu demando postulas detalajn klarigojn, kiujn ni prezentas al la Kongreso per speciala raporto.

« Fine, ni citos aparte la proponon de tri bohemiaj grupoj, rilatan al la nediskuteblaj rajtoj de la kreinto de Esperanto, ricevi la Nobel-premion de Paco. Ĝi montras nesufiĉan konon de la kondiĉoj, laŭ kiuj tiu premio estas disdonata.

« Ne nur la Kongreso, esprimante deziron en tiu rilato, ne utilis al tiu afero, sed ĝi malutilis, ĉar la Nobel-Komitato de l'Norvega Parlamento, pro la multeco de la proponataj kandidatoj, nepre malakceptas ĉiujn ne regule faritajn proponojn.

« La rajto prezenti kandidatojn laŭ la regularo de la fondaĵo Nobel, estas rezervita al la membroj de la jenaj anaroj :

1. La membroj de l'Nobel-Komitato de l'Norvega Parlamento, en Kristiano ;
2. La membroj de la Parlamentoj kaj Registaroj de ĉiuj regnoj ;

3. La membroj de l'Interparlamentara Konsilantaro, en Berno ;
4. La komitatanoj de l'Internacia Oficejo de Paco, en Berno ;
5. La membroj de l'Instituto de Internacia Juro, en Gand ;
6. La profesoroj de juro, politika scienco, historio kaj filozofio en la Universitatoj ;
7. La personoj kaj asocioj, kiuj jam ricevis la premion Nobel (1).

« Estas do nenio alia por fari ol aligi individue kiel eble plej multe, inter tiuj personoj, al la ideo proponi nian majstron por la premio Nobel. Tio koncernas tiujn inter ni, kiuj konas unu aŭ kelkajn inter la diritaj personoj, aŭ la grupojn, kiuj havas, pro ia aŭ alia kaŭzo, influon sur tiu persono. Tio estas do ago individua, kiun ni cetere rekomendas varmege al ĉiu esperantisto konscianta pri la grandega servo, kiun D^{ro} Zamenhof faris al la homaro.

« Krom la societoj, grupoj kaj elmontroj de la esperantistoj, rilataj al la propagando kaj instruado, oni devas ankaŭ konsideri la pli kaj pli multajn kolektiĝojn, kiuj uzas la internacian lingvon por diversaj specialaj aplikadoj, limiĝinte en urbo, en eĉ ubkvartalo, regiono aŭ lando, aŭ, kontraŭe, havante internacian karakteron.

« Ĉu konvenas konsili aŭ akcepti, por tiuj specialaj kolektiĝoj, unuformajn regulojn pri organizo kaj funkciado? — La respondo, tie ĉi, estas facila : estus celi la neatingeblon, se oni volus trudi unu saman modelilon al agadoj tiel esence diversaj.

« Sed, dirinte tion, kaj akceptante, kiel principon, lasi al ĉiuj esperantistaj kolektiĝoj la kiel eble plej grandan liberecon sin organizi laŭvole aŭtonome kaj sendepende, ĉu oni devas forlasi ian ajn ideon asocii ilin por iaj elmontraĵoj kaj

(1) Tiuj premiitoj estas : 1901, Frédéric Passy (Neuilly-sur-Seine, Francujo) kaj Henri Dunant (Heiden, Svisujo) ; 1902, Elie Ducommun kaj Gobat (Bern) ; 1903, Randal W. Cremer (Londono) ; 1904, la Instituto de Internacia Juro (Gand) ; 1905, S-rino de Suttner (Vieno).

vidi ilin grupitaj per federaciaj ligoj — tiel fruktoportaj kaj profitaj — por ĉiuj demandoj rilataj al komunaj interesoj?

« La ekzisto mem de la kongresoj respondas al tiu bezono de federaciaj ligoj, ĉe, kiel oni devas, oni konsideras la kongreson kiel kuniĝo de ĉiuj esperantistaj kolektiĝoj, kiaj ajn ili estas, kuniĝo kiu respektas iliajn sendependecon kaj aŭtonomion, kaj vokas ilin, egale, por esprimi siajn bezonojn kaj celojn, kaj por eldiri dezirojn pri decidoj kiuj povos kunhelpi al ilia komuna bono.

« Tial prezentiĝas la antaŭdemando: kiaj devas esti la organizo kaj la esenco de la esperantistaj kongresoj? Ĉu ili estas kunvenoj rajtigitaj por alpreni decidojn kaj formuli devigajn regulojn, ĉu nur esploraj kunvenoj, en kiuj la demandoj interesaj al la diversaj kategorioj de esperantistoj aŭ rilataj al la disvastigo de la lingvo povos esti prezentataj kaj libere diskutataj, por formuli simple la dezirojn aŭ bezonojn, kiuj povos esti facile ĉerpataj el la sperto aŭ el provoj de praktika aplikado?

« Tiu lasta solvo, evidente, ŝajnas la sola akceptebla, se oni konsideras la tutan esperantistaron.

« Universala kongreso de Esperanto ne devas esti nur la riprezento de la specialaj societoj, kreitaj en diversaj landoj por la propagando aŭ la instruado. Ĉiuj kolektiĝoj, formitaj por speciala kaj difinita celo, devas egale ĝui la rajton aŭdigisian voĉon; kaj same estas pri la izolaj esperantistoj, kiuj, ne volante aŭ ne povante varbiĝi en ian kolektiĝon, povas ludi, en Esperanto, rolon ofte tiel gravan; kiel tiu de kolektiĝoj aŭ societoj.

« Ne ŝajnas do konvene starigi, en la funkciado de niaj kongresoj, organizon de voĉdono aŭ de riprezento, kiu donus specialajn rajtojn al la delegitoj de societoj.

« Sed tiuj kunvenoj de kongresanoj havas tamen la grandan gravecon kiu rezultas de la alporto kaj komuniko de la kvanto da infôrmo, da sperto, kaj da teoria kaj praktika scio, kiun posedas ĉia esperantisto.

« Estas do necese certigi la ekziston kaj la regulan funkciadon de intersekvaj kongresoj; kaj tie troviĝas organiza demando, kiu ŝajnas tutspeciala esti kapabla kunigi la unuaniman decidon de la esperantistoj: la demando pri la rimedoj alprenotaj por certigi la konstantecon de la kongresoj.

« Ĝia solvo estas montrata de l'ekzemplo de tio, al kio estis kondukataj, en similaj cirkonstancoj, ĉiuj forte organizitaj sciencaj societoj, kiuj, pli kaj pli ĝenerale, kunvenigas regulajn, konstantajn kongresojn. »

« Ĝi konsistas el la starigo de ligilo inter la intersekvaj kongresoj, per la kreo de konstanta organo, nomata « konstanta komitato de la kongresoj », kiu ligilo estas efektivigata per la kreo de konstanta sekretario, servonta al la komitatoj kiujn elektas, intersekve, ĉiuj kongresoj por prepari la sekvontan kongreson. Fikse starigita en urbo konvene elektita, tiu sekretario tenas la arkivojn, kaj konservas la tradiciojn por la multaj devoj kiujn kaŭzas ĉiujare la klopodoj kaj korespondoj necesaj por la organizo de nova kongreso.

« Kompreneble — kaj cetere, laŭ la citita ekzemplo de ĉiuj societoj, kiuj kutimas kunsidi en regulaj kongresoj, kaj laŭ la metodo sekvita por la organizo de tiu ĉi Kongreso, — la Konstanta Komitato konservus por si la organizon de la kongresaj laboroj kaj la preparon de la eldonoj, kaj delegus parton de siaj povoj al Loka Komitato. Tiu ĉi lasta, elektita de la esperantistoj en kies lando sidos la Kongreso, prenus sur sin la lokan organizon, agante laŭ la ĝeneralaj instrukcioj de Konstanta Komitato kaj konsente kun ĝi.

« Resume, la *Konstanta Komitato de la Kongresoj* konsistus el :

« *Internacia Organiza Komitato*, elektita de ĉia kongreso por prepari la sekvontan ;

« *Loka Komitato*, apudmetita al ĝi, por difinita loka tasko ; kaj *Generala Sekretario de la Kongresoj*, kiu estus la necesa konstanta elemento de l'organizo, kaj kiun disponus la Organiza Komitato.

« Tia estas la organizo kiu, dank'al kelkaj amikoj de Esperanto povis tuj post nia komenco, esti provizore improvizata per la kreo de l'Centra Oficejo, liberigante nian aferon de la longaj embarasoj kaj malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj tiom da aliaj devis batali tiel longe.

« Ni devas ĝoji pri tiu iniciato, kiu havigis al ni, en oportune kuŝanta urbo informojn kiu povas fari la plej grandajn servojn.

« Ni scias ke la malavaraj fondintoj de tiu instituto certigis jam ĝian ekziston por kelkaj jaroj, kaj ni pensas ke

la kongreso, unuanime, esprimos sian kontenton pri tiu fondo, kaj profitos ĝin por organizi tuttrankvile la organojn de la Konstanta Komitato, ne bezonante sin priokupi, nun kaj dum iom longa tempo, pri la materiaj necesajoj.

« Speciala raporto estos komunikata al vi pri la nuna organizo de la Centra Oficejo, kaj pri la maniero, kiel tiu organizo povos esti fortikigata en la estonto. Tie ĉi, ni traktas nur la simplajn regulojn, kies alprenon la Organiza Komitato proponas por la intersekva organizo de la konstantaj komitatoj de la kongresoj.

« Tiuj reguloj povas esti resumataj kiel sekvas :

« Ĉia Kongreso de Esperanto, antaŭ ol disiĝi elektus la membrojn de internacia Organiza Komitato, konsistanta el... ĝis...membroj, kaj komisiita organizi la venontan kongreson, laŭ la kondiĉoj de loko kaj dato, kiuj estus donitaj al ĝi.

« Tiu komitato havus konstantan ĝeneralan sekretarion, kies restadejo kaj funkcioj estus difinitaj de speciala regularo kaj kiu povus havi apud si ian nombron de helpaj sekretarioj, ankaŭ elektitaj laŭ lia propono.

« Provizore, kaj ĝis alia decido, la sidejo de la Konstanta Komitato estus starigita en Parizo, en la sidejo de l'Esperantista Centra Oficejo, prenante profiton de la propono, kiun la fondintoj de tiu institucio bonvolis fari al la Komitato.

« La ĝenerala sekretario estus komisiata prezenti al ĉia nova kongreso la raportojn kaj dokumentojn necesajn al ĝia laboro. Li prenis sur sin la tenadon kaj konservadon de la arkivoj alkonfeditaj al lia zorgo de la organizintoj de tiuj kongresoj.

« Li estus komisiata, laŭbezone, efektiviĝi la publikigon de la oficialaj protokolaroj kaj de la periodaj dokumentoj, por kies preso la kongresoj estus lasintaj la necesajn monsumojn.

« Resume, lasante al la Lingva komitato la esploron de la proponoj 19^a ĝis 25^a :

« 1^o Ni proponas rezervi, por la okazo se iam Kongreso volos ilin uzi, la proponojn 1^{an} ĝis 18^{an} ;

« 2^o Ni rekomendas al la Societoj kaj Grupoj, per speciala, ĉi malsupra raporto, la proponojn 26^{an} kaj 27^{an}, pri la kreo de Esperantistaj konsulejoj ;

« 3^o Ni atentigas pri la ideoj, utilaj por la propagando, kiuj troviĝas en la proponoj 28^a ĝis 54^a resumitaj en la IV^a parto de tiu ĉi laboro ;

« 4^o Ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj la detalojn enhavatajn en parto V^a (Nobel-premio).

« 5^o Por certigi la daŭrigadon de la kongresoj, la konservadon de iliaj arkivoj, kaj la transdonadon de iliaj tradicioj, ni proponas krei Konstantan Sekretariejon de la Kongresoj, sidontan provizore ĉe la Esperantista Centra Oficejo, kaj kiun disponos, ĉiun jaron, Organiza Komitato elektita de la Kongreso por prepari la sekvontan Kongreson. »

Dum tiu ĉi longa senpaŭza legado multaj kongresanoj — eble lacaj pro la malfrua finiĝo de la hieraŭa kunsido — dormetas aŭ melankolie revas pri la vivplenaj kunsidoj de la Boulogne'a kongreso, dum kiuj oni ne suferis legadon de raportoj, sed kontraŭe partoprenis en viglaj kaj interesaj diskutadoj.

Fine, la atendita konkludo vekas la dormantojn, sed bedaŭrinde tute ne informas ilin pri la enhavo de l'raporto legita. Estas ja en ĝi parolate pri proponoj « de la 19^a ĝis la 25^a » aŭ ankoraŭ « de la 1^a ĝis la 18^a » ktp. ; kaj, kiam oni proponas akcepti kune la kvin konkludojn de l'raporto, neniu havas kompreneble ion ajn por rimarkigi, kaj oni konkludas, ke tiel decidiĝis la dua kongreso.

Tiam S-ro Aymonier (franco) stariĝas kaj esprimas la deziron, ke en la kongresoj de Esperanto *oni legu kiel eble plej malmulte da raportoj*, kaj prefere interdiskutu pri diversaj demandoj. Varma aplaŭdado montras, ke li klare esprimis la komunan senton de ĉiuj kongresanoj (1).

(1) Antaŭ la legado oni disdonis al kelkaj kongresanoj presitajn ekzemplerojn de la tuj legota raporto ; sed ne estis eble tiam disdoni tiajn ekzemplerojn al ĉiuj kongresanoj, ĉar la ceteraj estis ankoraŭ en la doganejo*. Verŝajne la laŭdinda intenco de la organizintoj estis dissendi la presitajn raportojn al ĉiuj kongresanoj *kelke da tempo antaŭ la malfermo de l'Kongreso*, por ke ili povu ilin tralegi private, libere pripensi ilian enhavon, kaj nur diskuti la proponojn dum la kongresaj kunsidoj. Ni esperu, ke oni sukcesos plenumi por la venonta kongreso tiel bonan planon.

* *doganejo*, *dogan-o* : vorto proponita de S-ro de Beaufront en la jus aperinta *Delmas'a libreto*. France : *douane* ; hispane kaj portugale : *aduana* ; itale : *dogana* ; angle : *custom-house* ; germane : *Zollamt*.

S-ro Wenger (sviso) petas, ke la oratoroj kelkafoje haltu kelkajn minutojn en siaj paroladoj por ke la kongresanoj povu eniri kaj eliri. La senĉesa bruado dum la legado de l'raporto malhelpis lin klare aŭdi.

S-ro Kühnl (bohemo) diras, ke estus tre bone, se, krom sia nomo, ĉiu Esperantisto skribus sur la poŝtkartojn ankaŭ la nomon de sia lando.

La prezidanto rimarkigas, ke tiu ĉi demando ne estas en la tagordo kaj sekve ne devas esti nun traktata.

Pro manko de tempo — ĉar la legado de l'raporto okupis la preskaŭ tutan kunsidon — oni decidas prokrasti ĝis la posta kunsido la diskutadon de la aliaj demandoj enskribitaj en la hodiaŭa tagordo.

Post la kunsido, la kongresanoj estas grupe fotografataj sur la ekstera ŝtuparo de l'Universitato.

*

* *

Je la dekdua, sur la promenejo de la « *Bastions* », Oficiala festeno.

Pro la granda nombro de la kongresanoj, la festeno estas organizita en la ĝardeno de l'« *Bastionoj* », apud la Universitato. Multaj tabloj estas preparitaj parte sub la verando de l'kiosko de l'Bastionoj, parte sub tendego speciale starigita en la apuda parto de l'ĝardeno.

Ciuj tabloj estas kovritaj per blanka senmakula tablotuko, sur kiu neniu homo ankoraŭ manĝis antaŭ ni, nek manĝos ankaŭ post ni, sur kiu ankaŭ la kongresanoj povus skribi proze au verse sian gratulon al la restoraciestro : ĝi ja estas el papero — ne forgesu, ke la kosto de l'festeno estas nur 2 fr. 50

— sed tiel bone aranĝita, ke multaj manĝantoj tute ne ĝin rimarkas. Ankaŭ el papero la delikataj buŝtukoj, sur kies angulo estas elegante presita la sekvanta menuo :

Antaŭmanĝaĵoj diversaj
Fiŝaĵo kun Geneva saŭco
Lardumita Lumbaĵo
Legomoj « ĝardenistine »
Svisa Fromaĝo
Diversaj Desertoj
Zamenhofaj biskvitoj
Sezonaj fruktoj
Vinoj

Noteto plie sciigas, ke « La Restoraciestro vendas aparte Esperantajn vinojn de la firmo Jadeau ».

La orkestro *Estudiantina* agrable ludas dum la festeno, sed malmultaj manĝantoj ŝajnas ĝin aŭskulti ; ili prefere babilas kaj rebabilas kun diverslandaj samideanoj, ĉar por tio ĉi precipe ili veturis Genevon, pli ol por aŭskulti muzikon. En la granda bruado de l'konversacioj iom da silento tamen fariĝas, kiam muzikisto ludas la *Esperantan Fajfon*, novan rekonilon, kies 4-notan arion la nekongresintoj povos trovi en la nunjara eldono de l'*Tutmonda Jarlibro*. La festenantoj ĝin ĥore fajf-ripetas, kaj plej rapide rekomencas la interrompitan konversacion kun tia fervoro, ke la Genevaj gazetoj, kiuj raportis pri la festeno, ne sciis, kiamaniere esprimi sian admiron por « tiu ĉi mirinda lingvo internacia » tiel facile kaj flue uzata de tiel diversaj nacioj.

Meze de l'bruado la kompatinda S-ro Moch vane kriegas, legante novajn telegramojn ricevitaĵojn ; nur lia raŭka estingita voĉo atestos morgaŭ kaj poste pri liaj laŭdindaj penadoj de kuraĝa kriisto, al kiu nur mankis *parol-funelo* !

Sed nun komenciĝas la toasto.

D-ro Zamenhof parolas unue. Li rememorigas pri la belaj tagoj en la Boulogne'a kongreso, kaj konstatas plezure la grandan sukceson de la Geneva, al kies organizintoj li esprimas sian sinceran gratulon kaj dankon. (*Longa aplaŭdado.*)

Generalo Sébert (franco) trinkas, en mallonga toasto, je l'nomo de l'francaj scienculoj, al la sukceso de l'Kongreso.

S-ro Boirac (franco) rememorigas, ke, la pasintan jaron, li toastis al la plej ĉarma duono de l'homaro, admonante la Esperantistinojn instrui pri Esperanto siajn infanojn. Hodiaŭ li esprimas la deziron, ke tiuj ĉi infanoj fariĝu pli kaj pli multaj, tiel certigante la baldaŭan sukceson de nia afero. Li toastas al la infanaro kaj junularo Esperantista.

Ŝ-ro Schneeberger (sviso) diras kun kia ĝojo la svisaj Esperantistoj invitis siajn fremdajn samideanojn. Li dankas ilin, ke ili venis tiel multope, kaj finas sian toaston per deziro de konstanta harmonio inter ĉiuj Esperantistoj.

S-ro de Beaufront, forte akklamata, tiam diras la sekvan-tan toaston :

« Karaj Amikoj,

« Flanke de l'ĝojo renkonti vin fine, alia sento min tute prenis, tuj kiam mi alvenis tien ĉi : impresoj de miro, de granda miro, antaŭ la rezultatoj akiritaj por ni post la dekok jaroj de l'esperantista militado...

« Tiom da baroj kaj malhelpoj troviĝis sur nia vojo ; la skeptikeco tiel obstine malcedis al ĉiu progreso dum la malvolviĝado de l'historio ; la ideo mem de lingvo internacia, stranga por la homa rutino, estis tiel funde ruinigita ĉe la publiko pro la fiasko de alia sistemo ; fine mi longatempe vidis Esperanton viveti tiel pene, kresketi tiel malfacile, ke, vere, nun mi apenaŭ povas kredi al miaj okuloj !...

« Ho ! sendube, ni ĉiam esperis, eĉ en la jaro mil okcent-naŭdek-kvina, kiam bato preskaŭ mortiga atingis nin en Rusujo, eĉ ĉe l'fino de l'jaro mil okcent-naŭdek-sepa, kiam ĉio ŝajnis perdita, kiam, per la dua malapero de nia centra organo, rompiĝis la tiama ligilo de nia vivo komuna !

« Sed mi sincere konfesos, ke en tiu tempo mi ne esperis — ke eĉ neniam mi esperis — vidi antaŭ la morto, en tia forteco la estaĵeton, kiun ni ricevis multe pli pretan, ŝajne, por morti ol por vivi. Kaj la fakto estas tiom pli kuraĝiga por la nunaj batalantoj, ke ĉio, dum longaj jaroj, estis por ni malhelpo. Esperanto vivis, kreskis kaj komencis venki ne precize ĉar la homoj ĉion faris, por ke ĝi vivu, kresku kaj venku, sed multe pli ĉar vere ĝi havis en si nekredoblan ĝermon de vivo, de venko !...

« Eĉ ni, amikoj, eĉ ni, pli ol unufoje alportis al ĝi danĝeron, ĉiam volante fari ĝin pli bela, pli perfekta. Sed, feliĉe, tiu tempo pasis, ĉar la Boulogne'a Kongreso tre saĝe komprenis, ke la lingva sorto de Esperanto ne povas, ne devas dependi de la hazardoj de kongresa konsiliĝo. Ĝi do petis la kreinton de Esperanto, ke li elektu specialan komitaton, al kiu apartenus en la Esperantistaro la ekzameno kaj solvo de la lingvaj demandoj sub la konstantaj direktado kaj kontrolado de nia kara Majstro. Sekve mi opinias, ke ni agus mallogike, kaj eĉ senrespekte por li, se, malŝatante institucion, kiun li kondukas kaj kreis laŭ nia peto, ni alportus ian lingvan demandon al la juĝo de l'kongreso, aŭ pli ĝustadire, al ĝia decido.

« Alian grandan bonon lasis al ni la Boulogne'a kongreso : mi volas paroli pri la Deklaracio rilate al la Esperantismo. Tiu ĉi neŭtraleco, solene proklamita antaŭ la mondo, de nia Majstro mem, ne permesas, ke en la kunvenejo de Esperantista kongreso oni traktu aŭ proponu aferon kontraŭan al ĝi. Kiam ni agas individue kaj private, nenia ĉeno nin ligas ; sed kiam ni agas korporacie, ni ne havas du manierojn, sed nur unu, por konvinki la mondon pri la perfekta neŭtraleco de l'Esperantismo : okupi nin je Esperanto sola ekskluzive.

« Fine, ni neniam forgesu, en nia militado, ke la sukceso de l'bataloj dependas por ni de la libereco ĉe la generaloj. La historio montras al ni, ke multaj popoloj venkiĝis, ke kelkaj eĉ mortis, ĉar ili havis centran komitaton, komitaton militan, kiu, for de l'batalejo, ne vidante la bezonojn, atakojn aŭ danĝerojn, per unu voĉo ne konante la veran situacion de la batalo, tamen instrukciis, ordonis, komandis, paralizante la agadon, nuligante la iniciativon de l'generaloj, kaj sekve la bravecon de l'militistaro.

« La generaloj ĉe ni estas la komitatoj de niaj societoj, la batalejo ne estas la mondo, sed ĉiu nacio aparte, ĉar ni estas internaciaj nur per la celo : tuj kiam ni produktas la plej sensignifan agon de propagando, ni fariĝas naciaj, kaj sekve dependas de leĝoj, kutimoj, gustoj esence specialaj.

« Ni do lasu al la generaloj de niaj bataloj la necesan liberecon kaj iniciativon, kiuj donis jam al ni grandan komencon de venko. Ni konservu por la tuta Esperantistaro nur *unu* postulon : la lingvan unuecon ; por ĝiaj societoj aŭ grupoj nur *unu* leĝon la neŭtralecon religian, politikan aŭ societatan.

« Kaj nun mi trinkas je l'sano de nia kara majstro kaj de lia tuta familio ; mi trinkas je l'sukceso kaj konstanta pli-grandigado de niaj societoj kaj grupoj ; mi trinkas je la plena harmonio de l'koroj en la propagando de nia granda ideo. »

Longa akklamado sekvas tiun ĉi toaston ofte interrompitan per aplaŭdoj de ciuj ĉeestantoj.

Poste parolas kapitano Capé (franco). Li estas certa pri la estontaj progresoj de Esperanto. Ĝiam neniu interesiĝis pri nia lingvo ; nun la gazetaro atentigas niajn festojn kaj kongresojn. Tio ĉi certe montras la faritajn progresojn.

S-ro Kuchler (germano) parolas je l'nomo de la germanaj Esperantistoj. Li dankas Svisujon, kiu akceptas hodiaŭ la kongreson kaj kiu donis al Germanujo bonegan propagandiston: S-ron J. Borel. Li trinkas al Svisujo kaj al S-ro Borel.

Parolas ankoraŭ poste S-ro Lambert (anglo) ; S-ro Marchal (anglo) ; S-ro Ayza (hispano) ; S-ro Pollini (italo) ; S-ro Jamin (belgo) ; S-ro Bein (polo) ; S-roj Schmidt (Sviso) kaj Bernard (Sviso), kiu dankas la Internacian Organizan Komitaton, kaj salutas S-ron Michaux « la kreinton de la Esperantistaj kongresoj ».

Tiel granda estas la nombro de la festenantoj, tiel vasta ilia liberaera festenejo, ke la paroloj de la oratoroj bedaŭrinde ne povas atingi, malgraŭ iliaj heroaj penadoj, ĝis la lastaj vicoj de la aŭskultantoj. Tiuj ĉi kompatindaj *nenion-aŭdantoj* provas iom konsoliĝi per privata konversacio, kies bruo malhelpas baldaŭ la aŭdadon por la apudaj *iom-aŭdantoj*. Novaj konversacioj do komenciĝas, kaj baldaŭ tiel granda bruado fariĝas, ke tute ne eble estas aŭdi la lastajn toastingojn, malgraŭ la laŭtegaj krioj de la oratoroj.

Sed, meze de l'bruado, jen ni ekaŭdas novan bruon : S-ro Michaux, plej serioze, S^o Pollen (anglo), kun mieno ĉiam gaja, kaj S-ro Seidel, vastventra ĝojega germano, grimpas triope sur tablon, frapadante per tranĉiloj sur boteloj. La botelo de S^o Michaux rompiĝas, sed tio ĉi neniom malhelpas la faman Boulogne'anon, kiu per tondra, de ĉie aŭdebla voĉo — li estas advokato — nun anoncas : Gesinjoroj !!... Mi faris grandan veton !... Kun la dika germano... mi vetis glason da biero... ke vi ĉiuj aŭskultos min silente ;... li perdis la veton, kiel vi vidas ;... — efektive nun regas plena silento, kaj la germano

konfesas, ke li perdis... — Kun la anglo... mi vetis, ke vi ĉiuj venos tuj kun mi sur la ŝtuparon de la Universitato,... por ke Sinjoro Caudevelle,... nia Boulogne'a kongresa fotografisto,... fotografu nin,... kaj ke neniu el vi moviĝos dum la fotografado.., Mi esperas, ke vi gajnios al mi ankaŭ la duan veton !... »

Ĉiuj ĉeestantoj varme aplaŭdas, kaj, lasante la festenejon, tuj sekvas la oratoron al la dirita loko, kie S-ro Caudevelle denove fotografas la kongresanojn.

Sinjoro Michaux gajnis ankaŭ la duan veton !...

*

* *

Dum la posttagmezo okazas multaj privataj kunvenoj. Jam antaŭ la festeno, la framasonoj havis specialan kunvenon en la framasona templo de la strato Bovy-Lysberg.

Posttagmeze kunvenas en diversaj ĉambroj de la *Komerca Lernejo* : je la 2-a, la Ruĝ-Kruculoj, kunvokitaj de Leŭtenanto Bayol ; je la dua kaj duono la membroj de la Lingva Komitato ; je la tria la Svisa Esperantista Societo ; je la kvara la Germana Esperantista Societo ; je la kvina la Internacia Societo de la Esperantistaj ĵurnalistoj, la francaj edukistoj kunvokitaj de S-ro Boirac, la ne-francaj edukistoj kunvokitaj de S-ro Ĉejka ; je la sesa la maristoj kunvokitaj de S-ro Mesny, kaj la Brita Esperantista Societo.

*

* *

Je la oka kaj duono vespere, en la Granda Teatro, unua teatra festo.

La tuta teatra ĉambro estas plena ; D^{ro} Zamenhof sidas en la centra loĝio ; Esperantaj flagoj pendas ambaŭflanke de la ludejo.

Ni aŭdas unue la « *Marŝo de la Esperantistoj* » ĵus verkitan de S-ro Deshays kaj kantatan de S-ino Guivy kun akompano per piano de S-ro Decrey.

Poste F-ino Zabilon d'Her, en blanka muslina robo surŝuita per verdaj steloj, deklamas per voĉo iom malforta « *Sub la*

faldoj de nia standardo » dum kvar junulinoj alte tenas ĉirkaŭ ŝi la Esperantan flagon, kaj « Excelsior^e ». Tre bona prononco (1) kompensas la malfortecon de ŝia voĉo.

Denove ni aŭdas kantojn de S-ino Guivy: *En Songo, Himno al la Kongreso, Birdoj forflugu!* kaj fine venas la ĉefa peco de la unua parto, nome amuza komedieto de Max. Maurey « *La Letero de Rekomendo* » lerte tradukita de S-ro Warnier.

Gi estas ludata de S-roj Leono Zamenhof (polo), frato de nia majstro, Bourlet (franco) kaj Pujula (katalano), kaj tre interesas la tutan ĉeestantaron. S-ro Zamenhof ludas rolon de ofic-petanto, kiu troviĝas « sur la fundo de l'mizero », kvankam li posedas multajn diplomojn, « eĉ la Ateston pri Kapableco ». Li meritas certe plej sinceran gratulon tiom per la vereco de sia ludo, kiom precipe per la neteco kaj klareco de sia prononco.

Post dekminuta interakto ni aŭdas denove kelkajn kantojn. D-ro Hanauer (germano) kaj F-ino Farnes (anglino) kantas la dueton el *Edzafesto de Figaro*.

S-ro Chavet (franco) kantas *france* « kanzonon », kiun li verkis pri la Boulogne'a Kongreso, kaj ricevas grandan sukceson.

D-ro Lambert (anglo) deklamas *La Korvo* tradukita el Edgar Poë, kaj post nova dekminuta interakto ekludiĝas « *La Floro de l'Pasinto* » unuakta drameto el la vivo itala, verkita de Edm. de Amicis kaj tradukita de S-ino Rosa Junck.

La du ĉefaj roloj estas plenumataj de S-ino Junck kaj S-ro Privat kun tia perfekteco kaj vereco, ke la okuloj de multaj aŭdantoj malsekiĝas ĉe la plej kortuŝaj momentoj, certa pruvo tiel vere de la talento de la aktoroj, kiel ankaŭ de la tute senpena komprenebleco de nia lingvo, kiu tiel facile ebligas

(1) Mi uzas tie ĉi la vorton « prononco », cetere jam uzitan aliloke de lertaj Esperantistoj, ĉar ĝi estas preskaŭ tute internacia (france: *prononcer*; angle: *to pronounce*; itale: *pronunciare*; hispane: *pronunciar*), dum la kutima esprimo *el-parolo* respondas nur la germanan *aus-sprechen* kaj estas tute ne komprenebla por negermanoj. Kiam mi parolas, mi ja ĉiam *el-parolas* kaj neniam *en-parolas*, ĉar mi ne estas ventre-parolanto.

Elparoli estas certe, kun *elrigardi, subaĉeti, eldoni, aldoni, elpensi*, kaj kelkaj aliaj, membro de la familio de la « teruraj nekompreneblaj idiotismoj elvokantaj la ĉielan venĝon », pri kiuj tiel ĝuste parolis Kabe en la Boulogne'a Kongreso.

plene ĝui en traduko la belecon de fremdaj verkoj, kvazaŭ ili estus senpere aŭdataj en ĉies nacia lingvo.

Longa aplaŭdado entuziasme salutas kaj dankas la diverslandajn aktorojn post la ludo de tiu ĉi drameto, kiu donis tiel bonan finon al tiel bela vesperfesto. (1).

*

* *

Jaŭdon 30-an de Aŭgusto. Sipveturado sur la lago kaj festeno en Vevey.

Belega estas la vetero — la vetero de Esperanto, oni diras; — jam je la oka matene la kongresanoj komencas enŝipiĝi sur la *Winkelried* gaje ornamita per Svisaj kaj Esperantaj flagoj. La orkestro *Estudiantina* instaliĝas sur la ferdeko, kie ĝi ludos dum la tuta veturado. La kongresanoj alvenas ĉiam pli kaj pli multaj, kaj, kiam ni ekveturas, kelkajn minutojn antaŭ la naŭa, estas apenaŭ eble iradi sur la ferdeko pro la granda amaseco de la veturantoj.

Baldaŭ ni glitas en dolĉa balanciĝo sur la mezo de l'blua, bluega lago, kies akvo mirinde pura kaj travidebla brilas en ŝaumetantaj ondoj sub la matena suno. Hela nebuleto, antaŭsigno de bela vetero, vualas mistere la montojn ĉirkaŭ la lago, dronigante en malproksimeco la horizonton, al kiu ni gaje veturas... Jes, gajaj estas la veturantoj, gaje ili babilas,

(1) Eble la legantoj trovas min iom senentuziasma kaj sendetala pri la muzikaĵoj kaj kantoj, kaj ili kredas, ke mi abomenas muzikon... Tute ne, sed mi kredas, ke en festoj de Kongreso pri *lingvo* internacia la muzikaĵoj estas tute flanka afero, certe iom utila por gajigi la kunvenojn, sed kiuj devas okupi *nur parteton* de la programoj. Ĉiu ja scias, ke eĉ en naciaj lingvoj la paroloj kantataj estas preskaŭ ĉiam nekompreneblaj por la aŭdantoj, kiuj lasas sin nur dolĉe luliĝi de la muziko, ne eĉ penante kompreni la sencon de la kantataj vortoj. Nu, mi kredas, ke Esperantistaj Kongresanoj ne faras sian longan vojaĝon al la Kongreso ĝuste por konstati la nedisputeblan muzikan talenton de siaj fremdaj samideanoj, sed precipe por *paroli* kun ili en Esperanto kaj aŭdi la lingvon klare parolatan, ĉu en privataj konversacioj, ĉu en diskutoj de proponoj, ĉu en dramoj aŭ komedioj, ĉu ankoraŭ en deklamoj aŭ monologoj, sed ne en kantado de muzikaĵoj eble plej melodiaj sed ne kompreneblaj, aŭ en senfina legado de raportoj plej lerte verkitaj..

ĝuante per rigardo la mirindan spektaklon, kiu malrapide disvolviĝas antaŭ iliaj okuloj... Grupetoj formiĝas, tie ĉi oni parolas pri la hieraŭa teatra festo, tie graciaj junulinoj prezentas albumon al la eminentaj Esperantistoj, por ke ili skribu kelkajn vortojn. Kiom da subskriboj devas doni nia kara majstro kaj S-ro de Beaufront sur albumoj, sur kartoj, sur fotografaĵoj, eĉ ili mem ne povus diri. Ambaŭ ĉiam plej kompleze skribas kaj skribas kun afabla parolo por ĉiu petanto...

Kvar horoj da ĉarma veturado tiel pasas tute ne rimarkite de la ravitaj veturantoj. Fine, je la dekdua kaj kvarono, la *Winkelried* albordiĝas ĉe la elŝipiĝejo de Vevey, kie okazas akcepto de la Urbestro iom surprizita de la iom tro frua alveno de nia ŝipo. Poste organiziĝas granda sekvantaro: Unue marŝas la « *Lyre de Vevey* », fanfaro kun kvindek ludantaj muzikistoj; poste venas D-ro Zamenhof kaj la eminentuloj de l'Kongreso kun infanoj ĝoje portantaj Esperantistajn flagojn; ĉiuj kongresanoj sekvas ordigitaj en kvarpersonaj vicoj. La tuta anaro procesie trairas la tutan urbon, kaj fine alvenas en la hotelon « *des Trois Couronnes* », kie okazos la festeno. Pro la granda nombro de la kongresanoj la hotelo ne estas sufiĉe vasta por ilin ĉiujn enteni. Estas tial organizita alia festeno en la proksima hotelo « *d'Angleterre* », kien la fanfaro ankaŭ kondukas la partoprenontojn. La festeno en la hotelo « *des Trois Couronnes* » estas prezidata de D-ro Zamenhof, kaj tiu en la hotelo « *d'Angleterre* » de S-ro De Beaufront. Jen estas la oficiala menuo presita sur eleganta ilustrita programo de la ekskurso:

Supaĵo je Portugala kremo

Merlango je blanka vino

Terpomoj nature

Bovaĵo je la modo kun laktukoj

Fritaj Terpomoj

Rostita Bovaĵo

Fazeoloj en Salato

Diverskoloraj glaciaĵoj

Deserto

Honorvinoj donacitaj de la Urbestro de Vevey

Post kanto de la himno Esperantista, ĝi estas fervore atakata de homoj, kies apetiton akrigis la ŝipveturado, kaj, dum la manĝado, estas aŭdataj kompreneble multaj toasty.

En la hotelo « *des Trois Couronnes* » parolas unue S-ro Von der Aa kaj S-ro Eug. Couvreur, kiuj diras bonvenon al la kongresanoj en nomo de la Urbestro de Vevey kaj trinkas al la honoro de D-ro Zamenhof. Iliaj toasty france parolitaj estas tuj tradukataj de S-ro Privat.

D-ro Zamenhof dankas la urbon Vevey en nomo de ĉiuj kongresanoj.

S-ino Junck alportas la salutojn kaj bondezirojn de S-ro Edmondo de Amicis, la aŭtoro de l'drameto tiel sukcese ludita hieraŭ vespere.

D-ro Giovanni Cognasso, profesoro en Torino, parolas *itale*. Li esprimas en nomo de Italujo la deziron, ke baldaŭ la lingvaj bariloj inter la popoloj disfalu dank'al Esperanto.

S-ro C. Bourlet faras humorajan toasty, en kiu li invitas la Esperantistojn trapasi Parizon, kiam ili veturos Anglujon por la tria kongreso.

S-ro Cart salutas la kantonon Vaud, kie li pasigis sian infanaĝon kaj kies flago havas samajn kolorojn kiel Esperanto. Gi iam fariĝu unu el la patrolandoj de Esperanto!

S-ro Boirac sendas koran saluton al la amikoj manĝantaj en la hotelo « *d'Angleterre* » kaj varme toastas al Svisujo.

D-ro Bein parolas poste pri Polujo, kaj S-ro Pourcines en nomo de la gazetistaro.

S-ro Boirac proponas, ke oni sendu telegramon al S-ro De Amicis, por danki lin pri la permeso, kiun li donis traduki la drameton luditan hieraŭ. Tiu ĉi propono estas aklame akceptata.

Fine *La Espero* estas ludata de la muzikistoj kaj kantata de la tuta stariĝinta ĉeestantaro.

Dume, en la hotelo « *d'Angleterre* » la toasty elokventeco ankaŭ fluadas en larĝaj riveroj.

S-ro Loedermann salutas la kongresanoj en nomo de la Urbestro de Vevey. Poste parolas D-ro Hanauer (germano), S-ro Nylén (svedo), S-ro Bobin (franco), S-ro Privat (sviso), kiu alportas la saluton de la manĝantoj en la hotelo « *des Trois Couronnes* ».

S-ro de Beaufront poste toastas. Li komparas la nunan staton de Esperanto je la estinta, kaj rememorigas pri la

dekjara senlaca kunbatalado de S-ro René Lemaire, kies nomon varme salutas la tuta aŭdantaro. Ni ne devas ekdormi, li diras, post niaj unuaj sukcesoj, sed daŭre bataladi per la plej bona el niaj armiloj, nome *per la individua propagando*. Fine, meze de granda entuziasmo, li petas la ĉeestantojn solene ĵuri, ke ili ĉiuj batalos individue laŭ ilia tuta forto kaj povo, eĉ ĝis la morto, por nia kara lingvo Esperanto.

Fine F-ino Zablon d'Her toastas al la Esperantistinoj kaj aparte al la unua franca Esperantistino, F-ino A. Roux ĉeestanta en la festeno.

Post la festeno, koncerto en la ĝardeno de la hotelo « *des Trois Couronnes* », sur la bordo de l' lago, kunigas denove la kongresanojn, kiuj aŭskultas kun plej granda plezuro la faman svisan kanton « *Ranz des Vaches* » mirinde kantatan de S-ro Castella kun akompano de la tuta muzikistaro.

Sed kie do estas D-ro Zamenhof? Ĉu eble li ne ĉeestas en la koncerto?... Mi baldaŭ trovas lin sidantan aparte en apuda anguleto de l' ĝardeno kun du svisaj blindulinoj, kiuj venis lin saluti kaj danki por la bono donita de Esperanto al la blinduloj. La Doktoro ilin kore kisis, kaj, nun tenante iliajn manojn en la siaj, li plej afable kaj sencere monie parolas kun ili, kiuj ĝoje aŭskultas la voĉon de l' Majstro...

Sed nun estas tempo por revojiri al nia ŝipo. Denove la muzikistaro kondukas nin ceremone ĝis la enŝipiĝejo. La *Winkelried* iom post iom pleniĝas, kaj, post fajfa saluto al la gastama urbo Vevey, ĝi malrapide debordiĝas kaj komencas reveturon al Genève, dum la « *Lyre de Vevey* » ludas sur la bordo la Esperantan Himnon, kaj granda popolamaso sur la kajo salutas per signoj de manoj kaj poŝtukoj...

Kiam ni alvenas Genevon, jam noktiĝis. La *Winkelried* alboriĝas ĉe la kajo « *Pâquis* ». Ĉiuj veturintoj malrapide elŝipiĝas kaj ordiĝas laŭ du longaj vicoj ambaŭflanke de la vojo, kaj kiam D-ro Zamenhof pasas inter ili meze de flagportantoj, longa ovacio kaj akklamado senfine salutas la amatan Majstron...

*
* *

Vendredon 31-an de Aŭgusto. — Je la naŭa kaj duono, en la ĉambro de l' « *Aula* » en la Universitato: Dua labora kunsido.

Sekretario skribas sur la nigran tabulon la sekvantan tagordon :

Protokolo ;
Leteroj ricevataj ;
Esperantaj konsulejoj ;
Centra Oficejo ;
Loko de la Dua Kongreso.

Post malfermo de la kunsido, S-ro Chavet legas la protokolon de la antaŭa kunsido. Tiu ĉi protokolo estas unuanime akceptata.

Poste, S-ro Moch legas multajn leterojn kaj telegramojn ankoraŭ ricevatajn.

S-ro Schneeberger, prezidanto, proponas, ke en la solena ferma kunsido de l'Kongreso, Anglo parolu en nomo de ĉiuj ne-svisaj Esperantistoj. Tiu ĉi propono estas akceptata.

La prezidanto poste donas la parolon al S-ro Moch, por ke li legu la raporton pri la kreo de Esperantistaj konsulejoj.

S-ro Moch, kies voĉon tute raŭkigis la laŭtega lego de telegramoj dum la festeno, petas, ke alia sekretario legu la raporton anstataŭ li.

S-ro Aimé legas do la sekvantan raporton feliĉe ne tiel longan kiel la unua :

Raporto de l'Organiza Komitato pri la kreo de Esperantistaj Konsulejoj

« Jam en 1896, oni komprenis kiel utila estus la ekzisto, en ĉiuj urboj, de personoj kiuj respondus al ĉiaj petoj pri seriozaj sciigoj, faritaj de esperantistoj, kaj oni faris interesan provon efektiviĝi tian ideon : la unuaj numeroj de *Lingvo Internacia*, de l'jaro 1897, enhavas nomaron de bonvolaj « agentoj de Esperanto », kiuj akceptis tiun taskon. Sed, pro diversaj kaŭzoj, tiu eksperimento estis antaŭtempa, kaj ne donis la esperitajn rezultatojn.

« En 1905, S-ro A. Carles, el Béziers (Francujo), prezentis ree tiun ideon al la organizantoj de la Unua Kongreso de Boulogne, atentigante pri la oportuno, kiu estus, se oni havus « en multaj urboj konsulojn al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni, kaj de kiuj (per malgranda maklera pago) oni povus

ricevi ĉiujn petitajn sciigojn, eĉ privatajn informojn pri komercistoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ĉiam sciis kien ili povus sin prezenti por ricevi bonan akcepton kaj ĉiujn postulitajn informojn, ne ĝenante iun. »

« La aŭtoro, cetere, ne donas detalojn pri la maniero efektiviĝi sian ideon. Li diras nur :

« Ĉu estus malfacile organizi konsularon ? — Certe ne.

« Anstataŭ krei la Tutmondan Ligon Esperantistan laŭ la propono kaj la difino de D-ro Zamenhof — kiu, laŭ mia opinio, enkatenuis ĉiujn iniciativojn, ĉu privatajn, ĉu de la diversaj naciaj societoj, sufiĉus krei *Centran konsulejon*, kiu tuj kolektus la aliĝojn de la unuaj bonvolantoj, kaj aperigus iliajn nomojn en la esperantistajn gazetojn. (Tio ja ne malhelpus la kreon de Centra Komitato aŭ Akademio difinonta *tuj kaj nepre* la elektojn de l'novaj vortoj, iliajn ĝustajn sencojn, la diversajn gramatikajn demandojn, k. t. p.).

« Mi do proponas al la Kongreso akcepti la principon pri kreo de konsuloj (oficialaj aŭ ne), kaj tuj nomi komitaton difinontan tiun kreon. »

« La Esperanta Klubo en Vieno proponis, poste, plenan projekton, kies teksto sekvas :

« Propozono por elekto de riprezentantoj esperantistoj en ĉiuj landoj.

« 1^e. — La centro por la unuigo de l'reprezentantoj esperantistaj estas la « Esperantista Organiza Komitato », 51, rue de Clichy, Parizo.

« 2^e. — En ĉiu loko de l'mondo kie ekzistas esperantistoj, estu nomigata unu riprezentanto.

« Se, en ia loko loĝas nur unu esperantisto, tiu mem estu la riprezentanto.

« Pli multe da esperantistoj loĝantaj en ia loko fondu grupon esperantistan, el kies mezo ili elektu la plej taŭgan kiel riprezentanto.

« Se kelke da grupoj ekzistas en ia loko, iliaj estraroj komune elektu unu riprezentanton.

« La grupoj havu la taskon serĉi la esperantistojn izolitajn en la amplekso de sia agado pere de ripetitaj alvokoj en la diversaj nacilingvaj gazetoj provincaj aŭ eĉ distriktaj kaj lokaj.

« 3°. — La riprezentanto havu la devon volonte respondi ĉiujn demandojn direktitajn al li kaj subteni ĉiun sin turnantan al li skribe aŭ parole, per konsilo kaj agado.

« Cia esperantisto vizitanta lokon, kie loĝas jam ia riprezentanto esperantista, havu la devon interkomunikiĝi persone kun tiu.

« 4°. — Nomo kaj adreso de ĉiu riprezentanto elektita estu sciigataj al la « Esperantista Organiza Komitato » en Parizo pere de l'grupoj ekzistantaj jam en diversaj urboj.

« Ciujare eliru poŝadresaro enhavanta la nomojn kaj adresojn de l'riprezentantoj laŭ landoj kaj lokoj en alfabeto ordo.

« Okaze de ŝanĝo de la loĝejo ĉiu riprezentanto havu la devon tuj sciigi la klubon plej proksiman per kiu okazis la anonco de lia adreso ĉe la « Esperantista Organiza Komitato » por ke tiu iniciatu la publikigon de l'nova adreso en la esperantistaj ĵurnaloj.

« Ciuj esperantistaj ĵurnaloj represigu la ŝanĝitajn adresojn laŭ la publikigo aperonta en la centra organo *Lingvo Internacia*. »

« Apenaŭ estas bezone rimarkigi kiel trudema estas la spirito de tiu projekto, kaj kiel neverŝajne estas, ke ĝi estu akceptata.

« Al la grupoj oni trudus « kiel devon » la elekton de riprezentanto; al la esperantistoj kiuj estas izolaj en sia urbo, oni trudus la akcepton de tiu tasko, por kiu ili eble tute ne taŭgas nek havas la rimedojn; al la gazetoj, oni trudus la impreson de ĉio kio koncernas la adresojn de la riprezentantoj, kiuj baldaŭ plenigus tiujn gazetojn kaj donus materion ekvivalentan al kelkaj volumoj de *Lingvo Internacia*: eĉ al ĉiu esperantisto, oni trudus viziti, en ĉia urbo, la riprezentanton; kaj ĉar, samtempe oni decidus ke ekzistos nur unu riprezentanto en ĉia urbo, kiel ajn granda ĝi estas, facile estas imagi kiom da personoj sin prezentus ĉiutage ĉe la Pariza au Londona riprezentanto.

« *Felice*, oni forgesis eldiri, kian punon ricevos la personoj kiuj ne plenumos tiujn devojn.

« Fine, oni metas, kiel centron de tia tutmonda konstanta organizo, la Organizan Komitaton, ... kies povoj finiĝos, la tagon mem de l'malfermo de la Kongreso.

« Ni kredas, ke la tre utila kreo de tiuj riprezentantoj (aŭ, pli bone kaj klare : « konsuloj ») povas efektiviĝi — precize tial ke ĝi estas memvideble utila — tre simple, per la sola agado de la libera iniciativo.

« Se la Kongreso, laŭ la esprimo de S-ro Carles, akceptas « la principojn de tiu kreo », kaj komprenigas tiel al la esperantistaro kiel utila ĝi estus, ne estas dubo ke multaj societoj kaj grupoj elektos baldaŭ, por sia urbo, unu aŭ kelkajn konsulojn (ĉar en la mezaj kaj grandaj urboj, unu ne sufiĉos). Ili sciigos sian elekton al la naciaj esperantistaj gazetoj, al la redaktistoj de adresaroj kaj al la Centra Oficejo.

« Tiu ĉi lasta, kiu intencas eldoni regule duonjaran *Esperantistan Societaron*, enpresos plezure tiujn utilajn sciigojn.

« Cetere io simila estas jam farita. Kiam, antaŭ kelkaj semajnoj, la Centra Oficejo petis la Societojn pri statistikaj sciigoj, por prepari sian *Societaron*, la Franca Societo por la Propagando de Esperanto montris, por ĉia grupo, la adreson de unu persono, komisiita kaj bonvola por respondi al eblaj demandoj : kaj tiuj personoj estas nenio alia, ol Konsuloj, sen la titolo.

« Agante tiel, oni povas konfidi ke, kian kunvenos la 3^a Kongreso, ekzistos jam multaj Esperantistaj Konsulejoj. Oni povos tiam kompari kiel ili estis elektataj de la grupoj, kiajn servojn faris tiu kreo, kiel ĝi estos plivastigebla kaj plibonigebla.

« La ĉefa malfacilo estas pri la lokoj kie ekzistas neniam grupo. Versimile estas ke, iom post iom, konsuloj povos esti elektataj en ili, de la naciaj societoj aŭ de la najbaraj grupoj. Sed, kompreneble, oni ne povas trudi la konsulecon al izola persono, kiu povus esti netaŭga por tiu tasko, kaj ne havi la materialan eblon ĝin plenumi.

« Pri la makleraj pagoj, kiujn aludas S-ro Carles, ni povas diri nenion ĉi tie, kaj versimile oni povos neniam fiksi regulojn. Multaj servoj, sendube, estos farataj senpage. Por aliaj laŭ la okazo la personoj kiuj petas ian sciigon komprenos mem ke ili devas repaĝi al li la elspezojn, kiujn ili kaŭzis.

« Rekomendinde ŝajnus : 1^o ke oni elektu *konsulejojn*, plivole ol *konsulojn*, t. e. ke la titolo konsulo estu donata prefere al personoj kiuj havas komercon, industrion aŭ oficon, kaj

sekve oficistojn, tiel ke oni estu certa ke iu estos ĉiam dome por respondi ;

« 2^o Ke la konsulejoj estu montrataj, sur la strata fasado, de blazonŝildo, verda kun blanka angulo portanta la verdan stelon, kaj portanta la surskribon Esperantista konsulejo de la Societo (aŭ Grupo) de... ».

« Se la Kongreso juĝas utila, ĝi povos elekti specialan komitaton por esplori tiun demandon. Sed ni kredas ke tio ne estas utila, kaj ke, se la Kongreso akceptas principe tiun ideon, la libera iniciato faros la neceson, kaj post unu jaro, ni konstatos grandan progreson. »

Post tiu ĉi legado komenciĝas longa diskutado pri la nomoj *konsulo* kaj *konsulejo*.

En la diskuto partoprenas kun diversaj opinioj S-roj Bobin (franco), Moscheles (anglo), Christaller (germano), Boirac (franco), Cart (franco), Deshays (franco), Mudie (anglo), Courtet (franco). Kelkaj kongresanoj proponas, ke oni alprenu la nomon « *delegito* » ; aliaj preferas « *konsilanto* » kaj « *konsilejo* » ; multaj opinias ke « *konsulo* » kaj « *konsulejo* » estas akceptindaj.

D-ro Bein (polo) prezentas proponon... ke oni ĉesigu la diskutadon pri la nomo.

S-ro Mudie (anglo) opinias, ke, antaŭ ol nomi la institucion, oni devus unue voĉdoni pri la principo de la fondo de tiu ĉi institucio.

La Kongreso konsentas pri tiu ĉi principo.

D-ro Hanauer (germano) diras, ke la Germana Registaro ne permesos, ke oni uzu la nomon « *konsulo* »

D-ro Mybs (germano) esprimas saman opinion kaj proponas, ke oni lasu al la nacioj la zorgon elekti mem la plej taŭgan nomon.

S-ro Boirac (franco) rimarkigas, ke la Kongreso ne pretendas leĝdoni por la diversaj landoj. La kongresanoj serĉas nur la plej taŭgan nomon alpreneblan.

S-ro Capé (franco) samopinias kiel S-oj Hanauer kaj Mybs.

Oni proponas ankoraŭ la nomon « *Esperantista Hejmo*. ». Alia kongresano diras, ke la vorto « *Esperantista...* » plene sufiĉos por gvidi la samideanojn, kia ajn estos la alia kunmetita vorto.

S-ro Schneeberger ĉesigas la diskutadon kaj ĝin resumas dirante, ke la kongreso unuanime akceptas la principon de la fondo de tiaj institucioj, kaj konsilas la alprenon de la nomoj « *konsulo, konsulejo* ». Kompreneble la nacioj, kiuj ne povos uzi tiujn ĉi nomojn, povos elekti aliajn pli taŭgajn en ilia lando. La organizado de konsulejoj en la diversaj urboj estas lasata al la privata iniciativo de la tieaj Esperantistoj.

Oni legas poste kelkajn praktikajn konsilojn de S-ro Michaux pri la propagando de Esperanto kaj diversaj aliaj ĝeneralaj punktoj, kiel ekzemple: ŝtampo de adreso sur la poŝtkartojn, zorgo atenti la poŝtajn regularojn ktp.

Post tiu ĉi legado, la prezidanto donas la parolon al S-ro Chavet, kiu ne legas — feliĉe — la sekvantan raporton, sed nur ĝin resumas rapide kaj legas ĝiajn konkludojn.

*Raporto pri la fondo kaj organizo de la
Esperantista Centra Oficejo
kaj pri ĝia agado de la 1^a de Oktobro 1905 ĝis la
31^a de Julio 1906.*

I. — FONDO

« La Esperantista Centra Oficejo estis fondata en Parizo en Septembro 1905, por helpi la propagandon kaj disvastigon de la helpa lingvo internacia Esperanto, kies unua Kongreso, okazinta en Boulogne-sur-Mer (Aŭgusto 1905) definitive montris la vivopovon kaj praktikan taŭgecon.

« Tiu fondo devenis de privata iniciato. Ĝin naskis la deziro doni al la du studaj komitatoj kreitaj de la Kongreso de Boulogne-sur-Mer (Organiza kaj Lingva Komitatoj) la necesajn rimedojn por ilia normala funkciado. Sed la fondintoj de la Centra Oficejo ankaŭ volis uzi tiun fondaĵon por helpi ĉiujn interesajn esperantistajn entreprenojn, kiuj estus petontaj tiun helpon.

« En unua cirkulero, je la dato de la 25^a de Septembro 1905, la Organiza Komitato sciigis al la Esperantistaro la fondon de la Centra Oficejo.

II. — ORGANIZO KAJ PROGRAMO

« Dua cirkulero, je la dato de la 6^a de Novembro 1905 konigis la nomon de la oficiala sekretario-agento de la Centra Oficejo, kaj tria cirkulero je la dato de la 6^a de Novembro 1905 donis detalojn pri la organizo de la Oficejo, montrante la programon de la diversaj laboroj, kiujn ĝi projektis entrepreni, kaj la rimedojn uzotajn por plenumi tiun programon.

« Laŭ la esprimoj de tiu cirkulero, la Esperantista Centra Oficejo, por faciligi la rilatojn inter la esperantistoj, ĉu grupiĝintaj laŭ lokoj aŭ specialaj okupoj, ĉu izolaj, projektis (restante tute sendependa de ĉiu jam ekzistanta grupo aŭ societo) :

« 1. *Doni sciigojn* pri la demandoj kiuj rilatas la subtenadon kaj propagandon de Esperanto al societoj, grupoj aŭ personoj, kiuj interesiĝas pri tio, kaj faciligi la rilatojn inter ili ;

« 2. *Prepari la studadon* de la demandoj kiuj povus esti enmetataj en la programon de la kongresoj, konferencoj aŭ aliaj kunvenoj, kiuj dezirus uzi la servon de la Oficejo, kaj helpi la komitatojn de tiuj kunvenoj, koncerne la kunvenojn kaj komunikojn ;

« 3. *Helpi kaj partopreni*, se tio konvenas, en la efektivigo de la decidoj de tiuj kongresoj, konferencoj aŭ kunvenoj ;

« 4. *Klasigi kaj konservi la arkivojn* de tiuj kunvenoj, ĉiujn dokumentojn kiuj povas esti alkonfidataj al la Oficejo, kaj ĉion kio povas interesi la Esperantistan movadon ;

« 5. *Organizi bibliotekon* enhavantan ĉiujn verkojn en Esperanto kaj pri Esperanto, kolektante ankaŭ, laŭ la eblo, la artikolojn de gazetoj kaj revuoj, kaj la verkojn rilatajn al demandoj interesaj por Esperantismo ;

« 6. *Kolekti ĉiujn sciigojn statistikajn kaj aliajn*, kiuj koncernas la diskonigon kaj la utiligon de Esperanto ;

« 7. *Starigi kaj plenigi ĉiutage bibliografion* de la verkoj en Esperanto kaj pri Esperanto. »

« Por plenumi tiun programon, la Esperantista Centra Oficejo intencis kolekti en konvena loĝejo :

« 1. *Bibliotekon* enhavantan la ĉefajn esperantistajn verkojn elirintajn de la komenco de nia afero, kaj tiujn, kiuj koncernas la lingvon internacian.

« 2. Kolekton de revuoj kaj gazetoj esperantistaj kiuj nun eliras, kaj de la ĉefaj malnovaj gazetoj,

« 3. Bibliografiajn katalogojn pri la esperantistaj verkoj (bibliotekaj verkoj kaj artikoloj de gazetoj kaj revuoj) ordigitajn laŭ la reguloj de la bibliografia decimala klasigo,

« 4. Specialajn katalogojn ĉiutage plenigatajn, pri la diversaj sciigoj interesaj por la Esperantistoj :

« Adresaron de la esperantistaj societoj kaj grupoj,

« Adresaron de la esperantistoj, kiuj havas rilatojn kun la Centra Oficejo,

« Adresaron de la komercistoj, kiuj vendas librojn aŭ objektojn pri Esperanto,

« Adresaron de la esperantista gazetaro,

« Adresaron de la ĉefaj esperantistaj kunvenoj k. t. p. »

« Nun, ni montros kiamaniere la Esperantista Centra Oficejo plenumis tiun programon.

III. — AGADO

1. Helpe donita al diversaj kunvenoj kaj societoj (1)

« Ni parolos malsupre pri la helpe donita de la Esperantista Centra Oficejo al la du Komitatoj, Organiza kaj Lingva, por la alcentrigo de iliaj korespondaĵoj, la preparo de iliaj laboroj, kaj la organizo de la Kongreso de Genevo. Nun ni devas paroli pri helpe donita al aliaj kunvenoj, komitatoj kaj societoj.

« En cirkulero datumita la 19-an da Marto 1906, la Centra Oficejo petis de ĉiuj esperantistoj de Parizo kaj de la ĉirkauaĵo, ke ili diru al ĝi, ĉu ili opinias, ke la fondo de novaj kunvenoj de Esperantistoj, grupigontaj ilin laŭ la specialaj priokupoj, estus dezirinda. Ĝi aldonis al tiu cirkulero precizan demandaron por la respondoj, kaj diris ke, se novaj kunvenoj estos montrataj kiel fondindaj, ĝi tre volonte disponigos siajn ĉambrojn kaj rimedojn por ilin faciligi.

(1) « La jena ĉapitro interesas pli speciale la parizajn esperantistojn; ni ĝin publikigas por doni ekzemplon sekveblan en aliaj urboj. »

« La respondoj al tiu cirkulero montris ke la parizaj esperantistoj deziris precipe :

kursojn de Esperanto okazontajn dum la posttagmezo,
kunvenojn por prepari teatrajn esperantistajn festojn,
kunvenojn de komercistoj,
kunvenojn de profesoroj de Esperanto.

« La unua deziro, pri *posttagmezaj* kursoj estis jam esprimata, de Decembro 1905 ; kaj en Januaro 1906, en unu el la ĉambroj de la Centra Oficejo, okazis unua kurso farita de la sekretario de la Oficejo. Laŭ la peto de la parizaj esperantistoj, du novaj kursoj estis organizataj de Majo ĝis Julio 1906, kurso unuagrada kaj kurso de parolekzerco. Samtempe oni organizis antaŭ tiuj kursoj, te-kunvenojn por la lernantoj de ambaŭ kursoj kaj la eksteraj esperantistoj kiuj bonvolos ĉeesti.

« Laŭ la deziro pri la *organizo de teatraj festoj*, la Centra Oficejo disponigis siajn ĉambrojn por tri teatraj vesperfestoj, kiuj okazis la 28-an de Aprilo 1906, la 23-an de Majo 1906 kaj la 23-an de Junio 1906. Je la unua festo, S-ro Carlo Bourlet, prezidanto de la Grupo Pariza faris paroladon pri la Kongreso de Boulogne-sur-Mer, je la dua, S-ro Th. Cart vic-prezidanto de la S.F.P.E., parolis pri Esperanto inter la blinduloj, kaj la tria estis honorigata de la partopreno de S-ro Leono Zamenhof, kiu bonvolis ludi rolon en esperantista komedio. En ĉia el tiuj vesperfestoj, ĉeestis 250 esperantistoj.

« La parizaj *esperantistaj komercistoj* kunvenis en ĉambroj de la Centra Oficejo la 21-an kaj 28-an de Majo, la 11-an kaj 18-an de Junio, kaj la 23-an de Julio 1906. Post tiuj kunvenoj, ili decidis fondi Komercan kaj Industrian Sekcion de la Grupo Esperantista Pariza kaj Francan Societon Esperantistan Industrian kaj Komercan. Samtempe, fondiĝis ankaŭ en Parizo Tutmonda Labora Societo. (Amika Unuiĝo de l'Esperantistaj Geoficistoj kaj Gelaboristoj).

« Dufoje kunvenis la *profesoroj* de Esperanto, kiuj fondis Instruan Sekcion de la Grupo Pariza. En unu el tiuj kunvenoj, S-ro Th. Cart havis la ideon fondi « La Barĉo » grupeton de parizaj esperantistoj, kiuj havas la Ateston pri Kapableco.

« Fine kunvenis ankaŭ en la ĉambrojn de la Centra Oficejo diversaj komisioj kaj estraroj de societoj, kaj okazis, en tiuj lokoj, ekzameno de Atesto pri Kapableco por publikaj instruistoj.

2. Kolektado de dokumentoj pri Esperanto.

« La Esperantista Centra Oficejo jam komencis kolekton de ĉiuj dokumentoj kiuj rilatas al la propagando de Esperanto, nome poŝtkartojn, afiŝojn, broŝurojn, ktp. Ĝi kolektis ankaŭ eltranĉaĵojn de la tutmonda gazetaro pri Esperanto. Jam multaj societoj kaj grupoj esperantistaj kutimas sendi al la Centra Oficejo unu aŭ kelkajn ekzemplerojn de ĉiuj dokumentoj kiujn ili eldonas pri tiu afero, kaj la Centra Oficejo zorge kaj atente ilin klasigas kaj konservas. Ĝi tre petas ĉiujn societojn kaj grupojn ke ili sekvu la ekzemplon donitan de kelkaj el ili, kaj pligrandigu, per siaj sendoj, tiun kolekton, kiu baldaŭ havos tre grandan intereson por la esperantistaro. La Centra Oficejo esperas utiligi ĝin por la ekspozicioj pri Esperanto, kiuj nun tre ofte okazas, kiel sekcioj de ĝeneralaj aŭ specialaj ekspozicioj. Jam multaj esperantistoj sin turnis al la Oficejo por ricevi de ĝi dokumentojn por tiaj ekspozicioj. Ĝis nun, ĝi ne povis ilin kontentigi, sed ĝi esperas ke post kelka tempo, dank'al la helpo de la esperantistoj, ĝi povos havi kolekton tute pretan, multekzempleran kaj tuj sendeblan al tiuj, kiuj petos ĝin por tiu celo.

« La Centra Oficejo preparas ankaŭ presitan kolekton de paroladoj pri Esperanto, kaj kolektojn de kliŝaĵoj por lumaj projekcioj, uzotajn kun tiuj paroladoj. Tiuj paroladoj kaj kliŝaĵoj estos pruntataj senpage al la paroladontoj.

3. Biblioteko, Kolektado de statistikaj kaj bibliografiaj sciigoj.

« La Esperantista Centra Oficejo povis ankaŭ kolekti, laŭ ĝia programo, esperantistan bibliotekon kiu enhavas nun preskaŭ ĉiujn librojn kaj revuojn eldonitajn de la komenco de nia afero.

« Ĝi kolektis ankaŭ katalogojn metatajn sur bibliografiajn kartojn, kiuj enhavas adresarojn de societoj, de kursoj, de kunvenoj, de izolaj, esperantistoj ktp, kaj katalogojn de libroj kaj revuoj, klasigitajn laŭ la principoj de la Decimala Klasigo por ilin alkonformigi al la ĝeneralaj laboroj de bibliografio, farataj de specialistoj, kaj precipe al la laboroj de la Universala Bibliografia Repertorio, kiu estas starigata, kun la helpo de

multaj diversnaciaj kunlaborantoj, sub la direkto kaj laŭ la plano de la Internacia Instituto de Bibliografio.

« Tiuj kolektoj de libroj, revuoj, dokumentoj kaj bibliografiaj kartoj povas esti uzataj de ĉiuj esperantistoj. La Centra Oficejo havas specialan legoĉambbron, malfermatan ĉiutage, kie ĉiuj personoj povas ricevi la sciigojn kiujn ili bezonas kaj legi la librojn kaj revuojn esperantistajn kiujn ili deziras.

« Por ke ĉiuj personoj povu profiti la rezultatojn de tiuj laboroj, kaj por ke ili ne estu utilaj nur al tiuj kiuj povas ĉeesti la ĉambrojn de la Centra Oficejo, la Oficejo decidis entrepreni la publikigon de verko difinita por doni al la tuta Esperantistaro la kolekton de la plej gravaj dokumentoj, pri la kreo kaj la disvastigo de Esperanto, kaj de la sciigoj historiaj, statistikaj kaj bibliografiaj kiuj povas havi intereson.

« Tiu publikigo, komencita sub la ĝenerala titolo *Esperantista dokumentaro*, konsistos el kelkaj partoj difinitaj por diversaj specoj de dokumentoj, kaj la unuaj volumoj estis starigataj ĝustatempe, por ke oni povu ilin prezenti, kiel specimenoj, al la 2-a Kongreso. La detalo de la serioj, el kiuj konsistos tiu *Dokumentaro* estos donata en la antaŭparolo metita en komenco de la volumo, kiu enhavas la represaĵon de la ĉefaj dokumentoj pri la Unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

« Aliaj volumoj sekvos, kaj estos publikigataj, ne laŭ fiksjaj intertempoj, sed laŭ la bezonoj, cirkonstancoj kaj rimedoj.

« La Esperantista Centra Oficejo intencas disdoni tiujn dokumentojn senpage aŭ je kostprezo al la societoj kaj grupoj esperantistaj, kaj eĉ al la izolaj esperantistoj, kiuj ilin eble deziras.

« Ni altiras speciale la atenton, inter la partoj jam komencitaj de tiu publikaĵo, al la statistikaj sciigoj pri la esperantistaj societoj kaj grupoj, el kiuj konsistas la volumo kies titolo estas *Esperantista Societaro*, kaj kiu estis verkata, dank'al informoj donitaj de la societoj mem, responde al demandaro aldonita al la cirkulero 6-a (20-an de Junio 1906) de la Organiza Komitato. Sekve de tio, tiu libro, kiun oni intencas eldoni duonjare (1-an de januaro kaj 1-an de julio), havas ĝustecon kaj precizecon, kiuj donas al li speciale atentindan valoron. Speciala raporto, donanta la nombrajn rezultatojn de

tiu ĝenerala etato de la nuna stato de la esperantistaj societoj, estos, cetere, prezentata al la 2-a Kongreso, por ke ĝiaj konkludoj estu enmetataj en la kongresajn protokolojn.

« La eldonantoj konfidas ke tiuj sinsekvaj volumoj estos multvalora fonto de sciigoj por la historio de la disvastigo kaj propagando de Esperanto.

« Alia parto de tiu *dokumentaro* estas difinita por la bibliografio de Esperanto. Ĝi donas etaton, kiel eble plej plenan, de la bibliografiaj notoj de ĉiuj bibliotekaj verkoj publikigitaj en Esperanto kaj pri Esperanto, de la kreo de la lingvo ĝis nun. Ĝi estas plenigota per perioda publikigo de la titoloj de la artikoloj donitaj en la gazetoj esperantistaj kaj eĉ de la ĉefaj artikoloj donitaj en aliaj gazetoj pri Esperanto. Por tiu grava entrepreno, la Centra Oficejo estos feliĉa ricevi proponojn pri helpo, de multaj esperantistoj.

« Por utiligi tiujn proponojn, kaj faciligi la taskon de ĉiuj kiuj volos uzi la Decimalan Klasigon por siaj propraj bibliografiaj laboroj kaj eĉ por la klasigo de siaj arkivaj dokumentoj, la Centra Oficejo eldonos en Esperanto la parton pli speciale aplikeblan al Esperantismo de Ĝenerala Lernolibro pri Bibliografio kaj de la Tabeloj de la Decimale Klasigo. Tiu verko eliros baldaŭ. Atendante, la esperantistoj povos trovi en la komenco de la volumo de la Bibliografia Parto de la *dokumentaro* resumon de la fundamentaj principoj, kiuj estis uzataj por la starigo de la Universala Bibliografia Repertorio: resumo kiu ebligos al ili utiligi de nun la jam presitajn bibliografiajn dokumentojn (1).

4^o *Helpo donita al la Organiza kaj Lingva Komitatoj Konkludo.*

« La raportoj, kiujn prezentis al la 2-a Kongreso la Organiza kaj Lingva Komitatoj sufiĉe montras la rolon luditan de la Centra Oficejo por helpi la laborojn de tiuj komitatoj, kaj la preparon de tiuj raportoj. Ili ebligos juste konstati la valoron de la servoj, kiujn faris la Centra Oficejo al la Espe-

En la numeroj de Marto kaj Aprilo 1906, de « Tra la Mondo » la sekretario de la Centra Oficejo donis ankaŭ la principon de la Decimale Klasigo, kaj la metodon uzotan por ĝin apliki al Esperantismo.

rantistoj faciligante la taskon de ĉiuj kiuj povis alporti sian helpon al la organizo de la 2-a Kongreso.

« La fondintoj de la Centra Oficejo estas feliĉaj pro tiu rezultato, kaj ili esperas ke la Kongreso bonvolos aprobi la penojn de tiuj, kiuj partoprenis, kun tre laŭdinda sindonemo, en la plenumo de ĝia programo.

« Ili estas ankaŭ feliĉaj sciigi al la Kongreso, ke dank'al favoraj cirkonstancoj, ili kredas ke ili povos certe daŭrigi, per siaj propraj rimedoj, kaj dum ankoraŭ kelkaj jaroj, la funkciaĉion de tiu institucio. Tiamaniere la esperantistoj kiuj aprobas ĝian programon, kaj kiuj havas intencon sin kunligi kun la fondintoj por ebligi ĝian estontan progresadon, havos antaŭ si la necesan tempon por esplori konsente kun ili la plej bonajn rimedojn por atingi tiun celon.

« Tio estas demando, kiu povas esti prokrastata, sed pri kiu, tamen, la fondintoj volonte intersanĝos ideojn, kiel antaŭesplorado, kun la interesigantoj.

« Nuntempe, la sola konkludo donebla al tiu raporto estas ke la Centra Oficejo estas feliĉa sciigi al la Kongreso ke, se tiu lasta opinias ke tio estas utila, ĝi proponas siajn rimedojn kaj servojn por la Konstanta Komitato kiu estas elektota por plenumi la dezirojn kaj decidojn de la 2-a Kongreso, kiel ĝi faris por la komitatoj nomitaj de la Kongreso, kaj por helpi tiun komision en la preparo de la 3-a Kongreso. »

Post tiu ĉi raporto, S-ro De Beaufront stariĝas kaj proponas danki la Centran Oficejon por la helpo, kiun ĝi jam donis al la tuta Esperantistaro.

Tiu ĉi propono de la prezidanto de la *S. f. p. E.* estas varme aplaŭdata kaj akceptata.

Kolonelo Pollen (anglo), prezidanto de la *British Esperanto Association*, poste proponas, ke la tria Kongreso de Esperanto okazu en Anglujo, kaj eble en Cambridge (*Aplaŭdoj.*)

D-ro Lambert (anglo) diras, ke eble la urbo Cambridge estas ne sufiĉe centra.

S-ro Mudie (anglo) rimarkigas, ke, kvankam Cambridge ne estas tre centra, multaj kongresanoj tamen venos, se nur venos ankaŭ D-ro Zamenhof. (*Aplaŭdado.*)

S-ro Bourlet (franco) forte aprobas, ke la tria Kongreso okazu en Anglujo. Sed, li diras, ĝi devas nepre okazi en *negranda* urbo, tiamaniere ke la kongresanoj plenigu la

tutan urbon, kiel ili faris en Boulogne, kaj tiel faru grandan impreson per sia nombro. En urbo tiel granda kiel Genève, ekzemple, la kongresanoj, kvankam tre multaj, ŝajnas tamen kvazaŭ perditaj en la tuta amaso (1).

Li do proponas, ke la Kongreso decidu :

1° La tria Kongreso okazos en Anglujo ;

2° Ĝi okazos en negranda urbo ;

3° La anglaj samideanoj elektos mem la plej taŭgan urbon por ĝi.

Varma aplaŭdado sekvas tiun ĉi proponon tiel klare esprimitan, kiun la Kongreso unuanime akceptas.

S-ro Mudie esprimas sian aprobon por la triobla propono de S-ro Bourlet.

S-ro Cunningham, prezidanto de la Grupo de Cambridge, esprimas la deziron, ke la kongreso okazu en tiu ĉi urbo. (*Aplaŭdado.*)

S-ro Cart petas, ke la dato de la Kongreso estu en la komenco de la monato Aŭgusto.

S-ro Mudie diras, ke la unua semajno de Aŭgusto estus eble tro frua, la dua semajno de tiu ĉi monato ŝajnas al li pli oportuna.

La tria Kongreso okazos do en Anglujo, verŝajne en Cambridge en la dua semajno de Aŭgusto 1907.

(1) Tuj post nia kongreso okazis, ankaŭ en la *Aula* de l'Universitato, kongreso de sanigistoj, kies anoj estis certe malpli multaj ol la Esperantistaj Kongresanoj. Ili tamen ŝajnis tre mutenombraj, ĉar ili havis ĉe la butontruo grandan kokardon, almenaŭ 5-centimetran diametre, kiun oni vidis de malproksime, kaj preskaŭ devige rimarkis ĉie sur la stratoj. Tiu ĉi kokardo estis ruĝa centre kun helflava rando kaj havis sur sia mezo metalan brilan krucon de Genevo. La flava koloro — la plej brila el la koloroj post la blanko — kaj la brileco de la metalo faris tre videblaj la diritajn kokardojn, sub kiuj estis ankaŭ blanka rubandeto kun la enskriba numero de ĉiu kongresano, dank'al kiu oni povis facile konatiĝi kun ĉiu ajn nekonata kongresano, kies numeron oni povis vidi sur la kongresa listo.

Eble en la tria kongreso de Esperanto oni povus havi analogian kokardon, kongresan signon pli videblan ol simpla verda stelo. Ĝi povus esti, ekzemple, verda en la centro kun blanka tre videbla rando, koloroj de la flago Esperantista. Kompreneble metala stelo povus ankaŭ brili sur la verda fono de la centro.

Post tiu ĉi decido pri la loko de la tria Kongreso, S-ro Schneeberger legas leteron ĵus ricevitan el la Vatikano de pastro Peltier, direktoro de *Espero Katolika*. Tiu ĉi letero estas skribita de la privata sekretario mem de l'Papo al Lia Monsinjora Moŝto Luigi Giambene, vic-prezidanto de la Roma Grupo Esperantista, kiu ĝin tradukis kaj resendis al la direktoro de *Espero Katolika*.

Jen estas ĝia teksto (1)

Al Lia tre Respektinda Moŝto Monsinjoro Luigi Giambene. — Romo.

El la Vatikano, la 27-an de Junio 1906.

« Via tre Respektinda Monsinjora Moŝto,

« Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l'Revuo « *Espero Katolika* », kiun vi humile prezentis al Li je la nomo de l'Pastro Emilo Peltier. Bonvolu, Via tre Respektinda Monsinjora Moŝto, konigi al la nomita Pastro la Papan plaĉon kaj komuniki la Apostolan Beŝon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l'Revuo.

« Plenuminte la ricevitajn ordonojn, kun la sentoj de grandega estimo mi diras min

« De via Respektinda Moŝto

« Tre sindona Servanto.

« Giovanni Bressan. »

(1) Ĝi estas afable komunikita al ni de Pastro Peltier por la raporto de *Lingvo Internacia*.

(Daŭrigota.)

TEDULO.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : Th. Cart, prezidanto ; Paul Fruictier, delegito ;

Pro Benoit, D^{ro} Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. : V. Chaussegros. — Teknika direktoro : Lengyel Pál.



ELDONOJ

DE LA

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(akcia societo

de diverslandaj Esperantistoj)

PARIS, 5^e

33, rue Lacépède, 33.

La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.

Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tute verkita en Esperanto, de P. FRUICIER. Klarigas aparte la uzadon de l'artikolo, verbo, participoj, tempoj kaj modoj, prepozicioj, ktp. Ebligas rapide akiri bonan stilon en Esperanto.

1 fr. 50. — 1 fr. 60

Esperanta Versfarado, de TH. CART kaj PARISOT. Klarigas per ekzemploj tiritaj el la Esperanta literaturo, kiamaniere D-ro Zamenhof kaj la plej lertaj poetoj esperantistaj ritmigus siajn verkojn. Gvidilo por ĝuadi la ĉarmon de la esperantaj versaĵoj. 30 cent. — 35 cent.

Frazlibro de l'Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto por la vojaĝo kaj ĉiutaga vivado kun tradukoj angla, franca, germana, hispana kaj itala; resumo de la esperanta gramatiko en kvin lingvoj; adresaro de grupoj esperantistaj en la tuta mondo, k. a.; *nova eldono* (3-a), en presado.

Kurloza Sunhorloĝo, de S. POLJANSKIJ. Montras, kiel oni povas facile konstrui praktikan sunhorloĝon en ĉiuj lokoj sur la tero; kvar desegnaĵoj kaj tabeloj klarigas la tekston; *2-a eldono*.

20 cent. — 25 cent.

Trafendita Turo, originala versaĵo en Esperanto kun franca traduko de TH. CART. Luksa broŝureto, vendata por la propagando inter blinduloj.

25 cent. — 30 cent.

Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina? Artikoloj tiritaj el *L'Espérantiste*, france kaj esperante verkita de L. DE BEAUFONT; enhavas ĉiujn argumentojn kaj rebatojn pri la akcepto de latina lingvo kiel internacia; ebligas facile rebati la tiel ofte faratajn kontraŭdirojn.

60 cent. — 70 cent.

Perdita kaj Retrovita, originala legendo en Esperanto verkita de E. BOIRAC, rektoro de la Dijona Universitato. 60 cent. — 65 cent.

Edziĝo Kontraŭvola, unuakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de V. DUFEUTREL; — ludita en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer:

60 cent. — 70 cent.

Homa Doloro, poemo originale verkita de FEZ. 30 cent. — 35 cent.

Paŭlo kaj Virginio, de BERNARDIN-DE-SAINT-PIERRE, tradukita de H. HODLER. 1 fr. 25. — 1 fr. 45.

Ruĝa Floro, rakonto de V. GARŠIN, tradukita de K. BOGUŠEVIČ. 30 cent. — 35 cent.

Sep Rakontoj, originale verkita en Esperanto, de IVAN MALFELIČULO. 1 fr. — 1 fr. 15.

Rolandkanto (*Chanson de Roland*), tradukita en Esperantaj versoj, de D-ro NOEL. 1 fr. 50. — 1 fr. 70.

Grasa lignaĵisto, tradukita el itala lingvo, de G. CHAVET. 50 cent. — 55 cent.

Elementa fotografa Optiko, de KARLO VERKS. Tiu verko montras kaj difinas la diversajn esprimojn teknikajn, kiuj estas kutime uzataj en fotografa optiko; — 1 broŝuro 12 × 19 cm. da 80 paĝoj kun klarigaj ilustraĵoj. 1 fr. 25. — 1 fr. 40.

Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto en Boulogne-sur-Mer 30 cent. — 35 cent.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpresoj estas senpaga; ĉiu nova enpresoj kosta 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn; por niaj abonantoj: 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Preso Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

Glasgow, 137, West Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo: « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — *S-ro Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

Peto al niaj Abonantoj kaj klientoj

Ni ankoraŭ tre petas niajn klientojn ke ili bonvolu

Ĉiam ripeti legeble sian ĝustan kaj tutan adreson sur ĉiuj siaj leteroj, por faciligi al ni la laboron kaj elserĉojn, kaj forigi prokraston.

Skribi, sur apartaj folioj, la diversajn korespondaĵojn, kiuj rilatas al 1-e, mendoj kaj abonoj; 2-e, sciigoj por la gazetaro.

Atenti pri la prezo de komercaĵoj *afrankite* kaj *neafrankite*.

Al la amerikaj kaj anglaj klientoj ni faras ankaŭ la peton neniam sendi monerojn en siaj leteroj; ĉiam skribigi sur la internaciaj mandatoj kiuj devas esti adresataj al *Preso Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris, la nomon de la poŝtoŝeĵo pagonta: « Bureau de poste n° 29, rue Monge, Paris. » Sen tiu surskribajo, ni havas multajn malfacilaĵojn por enkasigi tiujn mandatojn.

Tiamaniere, ĉiuj faciligos kaj rapidigos la funkcion de niaj diversaj oficoj; por tio, al ĉiuj antaŭdankon.

Lingvo Internacia.

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

